



Venontaj eventoj

👉 Hodiaŭ 👈

★ **7:30 ptm:** Jodi invitas vin paŭzi post vespermanĝo. Haltu ĉe Cuzco 117 por oazo de memgvida ripozo, tefesto, la ludo TEUMI (te-bingo), kaj akvomelona gazpaĉo!

Mardo

★ **2:00 ptm:** Trezorserĉado (angle, Geocaching) kun Jodi, Mel, Chris kaj Hoss. Kunvenu antaŭ la loĝejoj.

★ **7:30 ptm:** Katalin prelegos pri la vivo de Andreo CSEH en la komuna salono.

Merkredo

★ **2:00 ptm:** Steĉjo prelegos pri la mistera libro *Codex Seraphinianus*.

★ **7:30 ptm:** Vegana bakado. Chris kaj Hoss bakos por vi freŝajn bananopanon kaj suker-kuketojn, kiujn vi povos ornamati. (Kaj poste manĝi!)

La NASKa Fasko

Redaktejo: Asante n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzempleron el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj kontribuajtoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpas vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpas vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

Kiel Esperanto povas utili al unitariaj universalistoj

de Mar CARDENAS

Ni kaj niaj infanoj loĝas en mondo kiu ankoraŭ havas neniun oficialan komunan lingvon kaj kie dekoj da lingvoj estas tutlande aŭ internacie gravaj. Lerni la anglan estas malfacile, tempmalŝpariga, kaj alte-kosta, eĉ por denaskaj parolantoj.

Malgraŭ la mensaj avantaĝoj de la lernado de almenaŭ unu suplementan lingvon, la plejmulto da usonanoj, do, restas unulingvaj kaj maldankemaj pri lingvo-diverseco aŭ plurlingvismo.

Kion fari? La sinteno de “lasu ilin lerni la anglan” koncerne al ne-angla-parolantoj ne nur estas reflektado de ekonomia kaj politika malegaleco kaj superregado, sed estas ankaŭ perdita okazo por spirita alproksimiĝo. Tiu pritraktado reflektas la UU-an principon pri “justeco, egaleco, kaj kompato en homaj rilatoj”.

Kiel UU-anoj, ni estas kaptitaj en dilemo kiam temas pri politikoj rilate al la lernado de fremdaj lingvoj en lernejoj aŭ hejme.

Ni asertas, unuflanke, “la esencan valoron kaj dignon de ĉiu persono”. Aliflanke, ni asertas “la celon de monda komunumo kun paco, libereco, kaj justeco por ĉiuj”.

Ĉi tiuj du asertoj povas tiri nin en kontraŭaj direktoj kiam temas pri lernado de fremdaj lingvoj.

La esenca valoro kaj digno de ĉiu per-

sono necesigas la esencan valoron kaj dignon de la lingvo de ĉiu persono. Lingvo-diverseco estas, sekve, aĵo esence valora kaj ne estu ĝi eliminata.



Malgraŭ tio (1) la celo de lingvo-uzo estas interkomuniki, (2) komunikado malsukcesas sen komuna lingvo, (3) homoj parolas pli ol 6,000 lingvojn, kaj (4) monda komunumo, sekve, necesigas la adopton de universalan rimedon por lingva komunikado.

Tamen, lingva unueco ankaŭ estas esence valora kaj ankaŭ ne estu ĝi eliminata – efektive, ĝi devas esti pliigita!

Konsiderante kiom da lingvoj estas esence kaj internacie valoraj, kaj ke ili devas esti respektataj, kio estus gajn-gajna politiko por klasoj por UU-a junularo aŭ UU-hejmlernantoj, aŭ eĉ por niaj usonaj publikaj lernejoj kaj la Unuiĝintaj Nacioj, kiam temas pri lernado de fremdaj lingvoj?

Ni serioze sugestas la lernadon de Esperanto – specife, la lernadon kaj uzon de Esperanto kiel enkondukon de junuloj al fremdaj lingvoj kaj kulturoj kaj al la Unuiĝintaj Nacioj kiel tutmondan movadon por kulturo de paco.



Meĵa ŝvebas super la serpento-vojo – unu el la multaj fotindaj lokoj en la konkurso de trezorserĉado anoncita pasintsemajne. Kiom da trovendaĵoj vi jam fotis?

Esperantistaj “Agresantoj” invadis Kalifornion!

En la lasta numero de la Fasko, ni raportis pri *Esperanto, the Aggressor Language*, bone konata manlibro pri Esperanto eldonita de la usona armeo en la 50-aj jaroj. La celo estis utiligi Esperanton por krei realismajn militekzercojn kun kredeble fremda “malamiko”.

Malpli konataj estas la tri aliaj manlibroj, en kiuj oni ne nur instruis Esperanton por uzo en militekzercoj, sed elpensis fikcian “alternativan mondon” en kiu Esperanto-parolanta malamiko invadis Usonon.

La manlibroj estas FM-30-101, *Aggressor, The Maneuver Enemy*, FM-30-102, *Handbook on Aggressor Military Forces*, kaj FM-30-103, *Aggressor Order of Battle*. Kune ili detale priskribas fikcian federacion de nacioj, senkompatate regataj de la politika partio “Cirklo-Triangulo”, militema organizo kun propra ideologio, historio, kaj kulturo. Ankaŭ en tiu paralela mondo, Esperanto plenumis sian rolon kiel interlingvon – sed ne por batalantoj pacaj. En tiu mondo, nia lingvo funkciis ĉefe por unuigi la naciojn de la fikcia malamiko:

“Kvankam la civitanaro de la Agresanto konsistas el tre diversaj etnoj, ilin unuigas la naciaj celoj de siaj regantoj. Alia unuiga faktoro estis la adopto de Esperanto kiel oficiala lingvo.” (FM-30-103, p. 12).

Kompreneble, la esperantista agresanto estis nur duonkaŝita anstataŭaĵo por la ĉefa malamiko de Usono tiama: Sovetunio.



Parto de mapo kiu montras fikcian historion de la invado de Usono, fare de armeoj de la federacio “Cirklo-Triangulo”.

Krom propra lingvo, armeanoj de la Agresanto havis siajn proprajn uniformojn, insignojn, kaj taktikon. Ili estis ja timigaj batalantoj: *“La soldato de la Agresanto estas korpe trejnita, vigla, sagaca, kaj lerta. Kaj li plene kredas je la doktrino de tutmonda domino”*.

Per mirindaj, eĉ iom dronigaj detaloj, la manlibroj priskribas trajtojn de la Agresanto por la usonaj trupoj ludantaj tiun rolon: kiel ĝuste marki tankojn per cirklo-triangulo, la emblemo de la Agresanto; dokumentojn por aliĝi al la partio Cirklo-Triangulo (haveblajn en Esperanto, kompreneble); bildojn montrantaj kiel soldatoj de la Agresanto vestu sin; kiom granda estu la pensio por emeritaj soldatoj, ktp. Aperas ankaŭ longa listo de mallongigoj uzitaj de la Agresanto por ties diversaj organizaĵoj, inkluzive de “Lernejo de la Veterinara Medicino”!

Kial la Agresanto-projekto finiĝis? Sendube pro diversaj kialoj, sed unu estas aparte interesa: laŭdire, almenaŭ kelkaj de la Esperanto-parolantaj soldatoj fariĝis neregblaj. En *Brazila Esperantisto* (n-ro 311, jun 2000), J. PITON skribis:


“Mi sukcesis trovi en Interreto kaj komuniĝi kun usona ekssoldato, kiu havis kontaktojn kun skipo de Agresantaj soldatoj. Li konfirmis al mi [ke] la agresantoj konstante deĵoris en tiu sama teamo kaj tial ili estis bonege preparitaj, pli ol la ordinara soldatoj, kiujn ili devis trejni. Superaj en la batalekzercoj, tio certe ne estis utila por la animstato de la senspertaj ordinara trupoj.

La plej decida faktoro tamen estis la troa entuziasmiĝo de la Agresantoj. Ili havis unikan uniformon kaj propran lingvon, tial ili komencis senti sin parto de ekskluziva komunumo. Lingvo evidente rolis kiel identiga propraĵo. Ili forgesis sian apartenecon al la sama armeo de la ceteraj usonanoj kaj kelkaj ofte provokis disputojn



Prezentu **ARMILO!** (Translation: Present ARMS! Pronunciation: Pre-zen-ti AR-MEE-LOY.) Trigon troop commander and his staff salute absent dictato leader. Note armed bodyguards protecting the top-secret war map at rear.

El Amerika Esperantisto, majo-aŭgusto, 1964.



Emblemo de la Agresanto: la Cirklo-Triangulo

ekster la deĵorhoroj. La provoj teni ilin sub disciplino ... estis vanaj.”

En la lasta artikolo en ĉi tiu serio, ni trovos spurojn de la partio Cirklo-Triangulo ĉi tie ĉe UCSD. Ŝajne, la Agresantoj estas ankoraŭ inter ni!

